



Numero 2024: 29; julio 30.

Pezo: Word 40, PDF 260 KB, Alkroĉaĵoj: HT 66 KB, ILEI 183 KB. Sume 549 KB

Tonkin kaj teamo pri daŭripovo

UEA estis unu el tri organizantoj de virtuala kunveno en la 9-a de julio dum la Altnivela Politika Forumo de UN. Ĉi-jare la Forumo kunvenas en Novjorko por konsideri kvar el la 17 Celoj por Daŭripova Evoluigo, inter ili la 16-an Celon: 'Antaŭenigi la konstruadon de pacaj kaj inkluzivaj socioj por daŭripova evoluigo, garantii aliron al justico por ĉiuj homoj, kaj starigi efikajn, respondecajn kaj inkluzivajn instituciojn je ĉiuj niveloj'. En tiel nomata Flanka Evento, la tri organizantoj (UEA, plus SIL Internacia, plus la Komitato de Neregistaraj Organizoj pri Lingvoj) traktis ĉefe la rolon de la Internacia Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj (lanĉita de Unesko kaj traktita interalie dum la Montreala Universala Kongreso de Esperanto antaŭ du jaroj) kaj ĝiajn implicojn rilate lingvajn rajtojn kaj precipe plenumon de la 16-a Celon.

La plena teksto pri ĉi tiu temo estas alkroĉita (66 KB).

ILEI fidele kaj fidele raportas kvarfoje jare

Raportas la Prezidanto kaj la Estraro de ILEI pri trimonata agado, de aprilo ĝis junio. **Ŝlosilpunktoj:** ILEI-kongreso 2024; ILEI-kongreso 2025 en Beogrado kaj ĝia simpozia temo; kontribuo de ILEI al la UK en Aruŝa; Seminario por instruista trejnado kadre de internacia kongreso en Serbio; evoluoj de *Premio La Torre*; *Instruisto de la Jaro*; Lernolibro de Esperanto en la svahila, Simpoziaj Aktoj 2022-23 kaj aliaj eldonaj projektoj.

ILEI samtage dissendis sian jarraporton por la kongreso de ILEI en Brazilo.

Trovu ĝin ĉe: https://www.ilei.info/instancoj/Estrara_Jarraporto_2023-8-2024-7.pdf

Aperis la financa finkalkulo de ILEI por 2023, kiu montris pozitivan rezulton.

AnticIPI novaĵojn por interlingvistoj

Nun haveblas la numero 128 de Informilo por Interlingvistoj (IPI):

<https://interlingvistiko.net/wp-content/uploads/2024/07/IPI128.pdf>

Universitata grupo raportas

Estis tuŝitaj pluraj temoj de la anonco pri la apero libroforme de la prezentoj en antaŭaj simpozioj de ILEI tra la esploro pri misnovaĵoj en la universitato de Seviljo al la kursoj de Esperanto en la Teherana Universitato, sed la ĉefan atenton ricevis la

simpozio pri Artefarita Inteligento kaj Lingvo-instruado okazonta en la kadro de la kongreso de ILEI en 2025 en Beogrado. Ĉi tiu universitata grupo klopodos aranĝi ion, en kio povos partopreni esperantistaj kaj neesperantistaj fakuloj, kaj kiel scienca kunveno agnoskita fare de la landaj edukaj instancoj. Baldaŭ oni ricevos inviton pri kunveno de interpretistoj same okazonta en Beogrado en marto 2025. La venonta kunveno okazos en septembro.

Renato Corsetti

Filmo survoja

Mi informas vin pri mia tria filmo, kies manuskriptoj jam estas pretaj, sed ni ankoraŭ bezonas vian monhelpon por realigi tiun belan filmon. Via mondonaco ebligas al ni lui kameraon, reflektilon, voĉilon ktp. La titolo de la filmo estus *La forlasita virino* aŭ *La malfacila vivo de virino*, tiel Dankon Kwibe prezentas la projekton. Vidu ĉe:

<https://www.esperanto-afriko.org/category/dokumentoj/unuopaj-projektoj/>

Sendis Adjé Adjevi

Ĉinaj junuloj entuziasmas

Finiĝis la unua somera tendaro pri fremdaj lingvoj por infanoj ĉe la Esperanto-muzeo de Zaozhuang. Dum 6 tagoj la gelernantoj, inter la multaj agadoj, iom lernis Esperanton, la anglan, la korean kaj la Italian. Instruis S-roj Semio John Huang el Kanado, Choi Manwon el Koreio kaj mi.

.Alessandra Madella



Esperanto en la lukto

La sola virtuala muzeo pri la hispana enlanda milito enhavas nun tekston pri la uzo de Esperanto dum tiu historia evento. La muzeo enhavas multajn paĝojn kaj bildojn pri la milito en ĉiuj ĝiaj aspektoj, el la bataloj aŭ la internacia kunteksto ĝis la ĉiutaga vivo kaj la spertoj de la ordinara homoj. Ĝi estis kreita (kurioze) de scienca konsilio en Kanado, kaj troviĝas en: <https://vscw.ca/>.

La plimulto el la paĝoj havas versiojn en la hispana, la franca kaj la angla, kaj kelkaj en la ceteraj hispaniaj lingvoj. La teksto pri Esperanto estas legebla en la adresoj:

<https://vscw.ca/index.php/es/node/480> (hispane)

<https://vscw.ca/index.php/fr/node/480> (france)

<https://vscw.ca/index.php/en/node/480> (angle)

Ili estas malfermaj aldoni nian lingvon kiam ampleksiĝos la nombro da lingvoj.

José Antonio del Barrio, <http://www.delbarrio.eu>

Komerco en Aruŝa

Dum la 109-a UK okazos tradicia kunsido de IKEF jaŭdon la 8-an de aŭgusto. Ĉeestis Edwin de Kock, sudafrika profesoro kaj unu el la plej gravaj Esperanto-poetoj. Via partopreno estas bonvena! Se jes, kontaktu la prezidanton Ĉielismo

Prelego de Nina Daniljuk en la 58-aj Baltiaj Eo-Tagoj

Tiu BET-evento okazis en Tartu, Estonio, frue en julio. Jen la ligilo

<https://youtu.be/-q1zkGLS0ss>

Junifina festado en Burundo

Fine de junio la infanĝardeno *La Espero* en Rumonge festis triumfan finon al la lerneja jaro. La ceremonio spegulis la sukceson kaj kreskon de ĉiuj partoprenantoj dum la lasta lerneja periodo. La ceremonion malfermis la direktorino de la infanĝardeno, esprimante sian dankon al ĉiuj ĉeestantoj, precipe al la gepatroj kaj lernejoj aŭtoritatoj. Ŝi substrekis la engaĝiĝon de la gepatroj en la edukado de siaj infanoj, kaj ŝi dankis la lernejan administracion pro ĝiaj gvidado kaj vizio.

La nacia asocio de Burundo (ANEB), reprezentata de sinjoroj Pamphile kaj Hassano, esprimis dankvortojn al la instruistoj kaj infanoj por ilia kapablo kaj evoluo dum tiu jaro. La reprezentantoj de la asocio emfazis la gravecon de la edukada komunumo kaj la subtenon de gepatroj por la eduko de siaj infanoj.

Forta koncizigo de teksto de Hassano NTAHONSIGAYE (hasanntaho@gmail.com)

Altniverla esploro pri la Eo-kulturo

Ĉu ekzistas Esperanta kulturo? Donas respondon la nuna libro. Esperanta kulturo elformiĝis dank' al ĝia lingvokomunumo, dismetita en la mondo. Ĝi riĉiĝas daŭre el la kulturoj de siaj parolantoj, do temas pri inkluziva kulturo. La unua studo de Ilona Koutny enkondukas pri la nocio kulturo kaj provas doni trarigardon de ĝiaj flankoj en Esperanta kunteksto komence de arto tra la ĉiutaga kulturo ĝis la pensmaniero de esperantistoj; levas la problemon, ĉu temas pri Esperanta aŭ internacia kulturo, ĉu kulturo de esperantistoj. Sekvas 14 ĉapitroj en du partoj de 13 aŭtoroj el 10 landoj.

La unuan parton: *Kulturo – lingvo – lingvokomunumo* komencas la diskuta studo de Fabio Fortes (Brazilo) pri Esperanta kulturo kaj esperantistoj. Lingvo estas parto de kulturo kaj ĝia portanto, disvolviĝas en lingvokomunumo. Ilona Koutny (Hungario/Pollando) provas kapti la lingvan bildon de la mondo (LBM), kiu aperas en la lingvaĵo de diverskulturaj kaj - gepatrolingvaj esperantistoj. Sabine Fiedler (Germanio) analizas kiel kulturo trapenetas lingvon kaj kreas frazeologiaĵojn ankaŭ en planlingvo. Aleksandro Melnikov (Rusio) trakribis amason da Esperantaj tekstoj por pruvi ilian influitecon de Esperanta kulturo. El lia alia studo ni ekscios, kion tipa Esperanto-kulturano (TEk) el tio scias. Esperanto – kiel propra lingvo – kontribuas al la identeco de multaj esperantistoj – tion esploras Ida Stria (Pollando).

La dua parto: *Diversaj terenoj de la esperanta kulturo* prezentas gravajn flankojn de la Eo-kulturo post la enkonduka teoria studo de Svorad Zavarsky (Slovakio) pri la disvolviĝo de kulturo el latinaj bazoj tra la eŭropaj kulturoj al la sinteza kulturo de Esperanto. François Lo Jacomo (Francio) skizas la historion kaj situacion de Esperanta teatro, eluzante ankaŭ proprajn spertojn. Jukka Pietiläinen (Finnlando) resumas kiel la Esperanta gazetaro funkcias. Barbara Pietrzak (Pollando), en parto de la historio de la polaj Esperanto-elsendoj skizas la 100-jaran kontribuon de la radio al Esperanta kulturo. Michał Ryszard Balicki (Pollando) diskutas la eblon de Esperanta televido. Schiller Judit (Hungario) prilaboris la historian periodon de

kinoarto en Esperanto. Li Xin (Ĉinio) prezentas la modernan Esperanto-muzeon en Zaozhuang. Fine José Antonio Vergara (Ĉilio) analizas la ŝancojn de Esperanto por la scienco en la komenca periodo.

La nuna libro estas la dua volumo de universitataj lernolibroj de la Interlingvistikaj Studoj, kiu ĉerpas el la 25-jaraj spertoj por doni superrigardon de la Esperanta kulturo. La kontribuantoj estas instruistoj kaj studentoj de la Studoj. La prilaboron de la temoj helpas la *Demandoj kaj diskuttemoj* fine de la studoj. La verko celas ĉiujn, kiuj interesiĝas pri la kolora temo kulturo. La Interlingvistikaj Studoj de Adam-Mickiewicz-Universitato (AMU) ekde 1998 ofertas internacian postdiploman studprogramon, kiu – laŭ la vasta senco de interlingvistiko – envolas historion de planlingvoj, internacian kaj interkulturan komunikadon, bazajn nociojn de lingvistiko kaj koncentriĝas al aliroj al la plej sukcesa planlingvo Esperanto (lingvistika, kultura kaj historia aspektoj). Ekde la studjaro 2022/23 startis magistras studoj por internacia studentaro kombinate la suprajn terenojn (en Esperanto) kun informmastrumado (en la angla). La unua libro en la serio Interlingvistikaj Studoj estis Interlingvistiko de Věra Barandovská-Frank. La tria temo pri komunikado. Tiuj ĉi libroj estos nemalhaveblaj en universitata instruado de esperantologio, ja ne ekzistas ankoraŭ tia serio da lernolibroj, krome ili povos altiri la atenton de ĉiuj, kiuj interesiĝas iom pli profunde pri la koncernaj temoj.

Poznano, aŭgusto 2022. Ilona Koutny, Redaktoro, gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj

===== vortoj: 1354 =====

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)



La Komunikado iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>>.

Aperintaj komunikadoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <https://www.ilei.info/agado/EKO.php>

La unuaj dudek numeroj de 2024 nun aperas tie, kune kun la kolekto el 2023

ALDONU AŬ SUBTRAHU VIN: Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Por forigo, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apartenas. Mi povas forigi nur personojn, kies retadresoj estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikadojn pere de retlisto.